12-a JARO, N-o 439 MONATA ESPERANTO-GAZETO 25. MARTO 1936

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO : 67, avenue Gambetta, Paris 20e
Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris : Bruxelles n-o 350 189, S'Gravenhage n-o 211 533 Kopenhago n-o 4 986, Paris n-o 1234 22. Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT. bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « Bannier ».

NI HAVU ĈIAM ANTAŬ LA OKULOJ LA CELON ATINGOTAN

Dum la pasintaj jaroj, nigre stampitaj per gravaj malvenkoj por la socialista laboristaro tutmonda, multaj leteroj k artikoletoj pasis tra niaj manoj, en kiuj SAT-anoj aŭ simplaj legantoj de niaj gazetoj esprimis sian angorsenton, sian ĉagreniĝon, sian afliktiĝon ĉe la ekvido, kiel eĉ esperantistoj ne povas fosi trankvile k persiste sian sulkon, sed kiel ili, imitante la manierojn enkondukiĝintajn en la ĝenerala laborista movado, ĵetiĝas en la kirlaĵon de malpaciĝoj k skismoj, kun iliaj lavangoj da insidatakoj, insultoj k kalumnioj.

Antaŭ mi kuŝas unu el tiuj skribaĵoj. kiun ni ricevis en aŭgusto 1933 de SAT-ano 17.146. Ĝi siatempe ne povis aperi en « S-ulo », kiel multaj similaj, ĉu pro spacomanko, ĉu pro tio, ke ni opiniis, ke tiaj atestoj simple konstatas k konfirmas faktojn, ne alportante novan ideon aŭ solvon al la problemo. Tamen, post distanco de 2 ½ jaroj, ŝajnas al ni utile aperigi grandan parton el tiu skribaĵo, por tiri konkludojn en la aktuala stato de l'movado. Ni rimarkigu nur, ke en la momento, kiam la K-do prenis sian plumon, estis ĵus okazinta *dua* skismo, nome la stariĝo de ISE en Vieno.

Konstatinte, ke « anstataŭ unue venki, la laborista movado dispartiĝis k (kio estas pli grava) la partoj kontraŭbatalis unu la alian, profite al niaj kontraŭuloj », K-do 17 146 daŭrigas : « En la esperantista movado ŝajne la historio iras la saman vojon... Ĉu neniam ni iĝos pli saĝaj ? Ĉu la ekzemploj ne estas okulfrapaj por ni ? Jam disiĝis niaj komunistaj Gek-doj. Jen denove branĉo estas falonta, aŭ pli bone, radiko, kiu devus alporti vivigajn sukojn, estas rompiĝonta. ISE estas stariĝonta. Ĉu ni denove travivos tian hontigan komedion kiel antaŭe ? Antaŭ mi kuŝas iu *Internaciisto* el la komenco. Ĝi volas havi nenion komunan plu kun ni, kun SAT. Sed mi entute kalkulas 68-foje la triliteran SAT k sennombrafoje la nomon « Lanti » en ĝi. Ĉu tio prosperigas la propagandon por la esp. movado, por kiu multaj el ni oferas tiom da peno, da mono, da tempo, kelkfoje tri aŭ kvar vesperojn semajne ? Gek-doj, rekonsciiĝu ! Ni pruvu, ke esperantistoj ne sencerbe imitas la landajn organizojn, sed ke ili akiris pere de esperanto pli da *prudento.* »

Nu, diros iuj K-doj : Tio estis antaŭ 2 ½ jaroj. Sed hodiaŭ la spiritostato k la situacio tute ŝanĝiĝis. Montriĝas forta emo al rekuniĝo de l'lab. esp-istaj fortoj.

Ĉu vere ? Ĉu oni hodiaŭ pli fideme, pli amike, pli ŝate interrilatas ? Ĉu tiuj ekzemple, kiuj forlasis SAT, ĉar ili ne plu sentis sin hejme en nia organizo, hodiaŭ volas akcepti ĝian larĝspiritan Statuton, aŭ *eĉ nur konsenti al ĝi vivrajton* ? Por al tio respondi, ni nur bezonas preni en manon tute freŝdatan numeron de « Proleta Esperantisto », organo de franca IPE-sekcio (januaro 1936). Tie la iama SAT-ano Bubu (Boubou), kiu ĝis la skismo estis tute konsentinta kun la gvidprincipoj de SAT k akceptinta ĝian statuton, kun plej granda malestimo al la 1.400 *individuaj* k *konsciaj* membroj de SAT demandas, kiom valoras tiu manpleno kompare kun la 25.000 (jes, dudek kvin mil !) prolet-esperantistoj en la tuta mondo.

Pri la fantazia cifero ni eĉ ne kverelu ĉi tie ; kredeble ĉiu, kiu iam k ie komencis lerni esperanton en laborista medio, estas enkalkulita en ĝi ; supozeble la nombro entenas ankaŭ nurajn simpatiantojn, kiuj foje prononcis favoran vorton pri nia afero. Sed ni faru kontraŭdemandon al Bubu : kial do li k liaj amikoj klopodas tiom fervore pri la memelektita sorto de l'1.400 SAT-anoj, se restas al li tiu vasta agadkampo, nome 23.600 prolet-esperantistoj, kiuj bezonas lian spiritan k organizan helpon ? Kial li ne ĵetas sin sur tiun kampon, trankvile lasante la SAT-anojn sekvi sian vojon laŭplaĉe k fosi sian sulkon laŭ sia bontrovo ?

Ne atendante, kion Bubu povus respondi, ni mem respondos : Ĉar SAT, kvankam ĝenata ankoraŭ per monŝuldoj el pli fruaj jaroj, kiuj treniĝas tra la buĝetoj, sukcesis kuraci siajn vundojn ĝis tia grado, ke hodiaŭ ĝi *sen ajna risko povas aperigi regule siajn du dense kompostitajn gazetojn k sian Jarlibron.* Montru, se vi povas, unu el la skismaj organizoj, kiu kapablas la samon ! Pruvu, ne per senbazaj asertoj, sed per *faktoj*, ke vin sekvas konscia, disciplina, esperantajn gazetojn leganta membraro ! Fariĝu, antaŭ ĉio, pli modestaj k ne fanfaronu pri 25.000 prolet-esperantistoj k similaj blufaĵoj !

Sed nun vorton pri la admono esprimita en la skribaĵo de K-do 17.146 : « Ni pruvu, ke esperantistoj ne sencerbe imitas... » Jes, K-do, pro tio SAT havas kiel bazon la sennaciecan strukturon k la konforman statuton, en kiu oni i.a. povas legi : « SAT, ne estante politika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj k toleremaj rilate al la politikaj k filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj k sindikatmovadoj ; per komparo de faktoj k ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi la *dogmiĝon* de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj. »

En tiuj linioj esprimiĝas la kvalitoj esence revoluciecaj de nia SAT-organizo, la originaleco de nia tasko, pro kio la tre profunda dinamika forto de nia asocio ne estas mezurebla per simpla ekvacio aŭ per cito de membroferoj... Tion devas lerni kompreni la Gek-doj, ke havante en manoj tiun universaligan instrumenton, kia estas esperanto, ili estas kapablaj starigi al si unikan, tre difinitan taskaron en la proleta movado ; ĝuste tion faris SAT k tio estas ĝia ekzistokialo. Ekipite per esperanto, ni povas el-

paŝi al la *konkreta*, ne nur frazuma unuigo de l'mondproletaro sin pretiganta al dispremo de l'universale reganta kapitalismo.

N. B.

KOREKTO. — Bonvolu fari en la fruntartikolo de l'lasta n-o de « S-ulo », p. 26, unua kolono, 28-a linio de malsupre (se vi ne mem jam faris dum legado) jenan korekton : Devas esti *ilian* (opinion) anstataŭ *alian*.

XVI-a KONGRESO DE S.A.T.

en MANĈESTRO (Britio)

2-7. *aŭgusto* 1936.

Adreso de la OKK, 16, Lily Street, Manchester 8. (Britio).

4-*a Komuniko.*

Karavano el Nederlando. — Jam kelkajn jarojn nombro da nederlandaj esperantistoj karavane vizitis la SAT-kongreson, k ĉar la vojaĝmaniero plaĉis al ĉiu partopreninto, oni nunjare intencas organizi karavanon sammaniere. La vojaĝo komenciĝos dimanĉon la 26-an de julio k finiĝos la 9-an de aŭgusto ; do ĝi daŭros 15 tagojn. La vojo estas Amsterdamo, Utrecht, Gorinchem, Breda, Antverpeno, Gento, Brugge, Ostende, Dover, Londono, Windzor, Oksfordo, Stratford-on-Avon, Stone, Manĉestro. Pri la beleco de l' vojaĝo ne necesas paroli ; precipe la suda parto de Anglio estas fama pro siaj ondaj, arboriĉaj pejzaĝoj. La veturantoj restos kelkajn horojn en Gento, same en Brugge (konata pro siaj mezepokaj konstruoj), pasigos tutan tagon en Ostende, traveturos Londonon sub la gvidado de angla K-do k vidos Windzor k Stratford-on-Avon, la naskiĝlokon de Ŝekspir. Do la vojaĝo mem estos festo.

La kosto estas entute 50 guldenoj. La sumo estas granda, precipe pro la marvojaĝo kiu daŭros 3 1/4 horojn, sed por tiu pago vi povas akiri vojaĝon, kiu restos neforgesebla en via memoro. En la sumo estas kalkulita la vojaĝkosto k la manĝoj (escepte la tagmanĝoj dum la 4 tagoj, kiujn oni restos en Manĉestro). Tre verŝajne, komuna pasporto estos havebla por la tuta partoprenantaro. La pagmaniero estas : 20 guldenoj antaŭ la I-a de majo, k la resto antaŭ la 15-a de julio. Oni kompreneble rajtas partopagi.

Se vi deziras k povas kuniri, anoncu vin baldaŭ. La organizanto devos longe antaŭe mendi aŭtobusojn, k se ili estos plenaj, li ne povos rezervi spacon por malfruuloj. Jam anoncis sin kelkaj K-doj, k vi ankaŭ povas imiti ilin, skribante al K-do *C. J. v. Veenendaal, West-Graftdyk*, Holando. (Ĝirnumero 209354.)

Fakkunsidoj. — La OKK aparte klopodas por interesi meti-sindikatojn pri la Kongreso. Aktivan intereson ĉiu sindikato havos, sciante ke okazos internacia renkontiĝo de la propraj sammetianoj. Tial la OKK provas aranĝi fakkunvenojn, ĉe kiuj K-doj sammetiaj povos diskuti komunajn interesojn k celojn. Kelkaj metalaboristoj k kolorigistoj, kiuj ĉeestos la Kongreson, jam esprimis sian dezirón komunagadan k ni do aranĝas por ili kunsidojn. Ĉiu koncerna K-do anoncu sin al la OKK.

Pluajn kunsidojn similajn ni esperas aranĝi, pri kiuj detaloj aperos en venonta komuniko.

2-*a Listo de aliĝintoj.*

17. K-do L. Deij, Roterdamo. 18. K-dino B. Davies, Manchester. 19. K-do T. Scott, Glasgow. 20. W. Varley, York, Anglio. 21. K-dino M. Carey, Liverpool. 22. K-do J. J. Ingham, Blackpool. 23. M. Starr, Long Island City, Usono. 24. J. Ege, Los Angeles, Usono. 25. P. T. Iustesen, Kaamanen, Finlando. 26. E. Baro, Paris. 27-28. Gek-doj Veenendaal, West-Graftdijk, Nederl. 29. K-do Chiland, Paris. 30-31. Gek-doj Campbell, Dunfermline, Fife, Skotl. 32. K-do K. Osterholm, Malmö, Svedio. 33. K-dino H. Buis, Bussum, Holando. 34. K-do K. Vigier, Valence d'Agen, Francio. 35. R. Prudek, Valence d'Agen. 36. A. E. Nientker, Amsterdam. 37. R. Porter, Manchester.

Kial "For la Neŭtralismon!"?...

Taksiista[1] Grupo en Londono

Antaŭ kelkaj semajnoj fondiĝis en Londono la « Taksi-Kontrolista Esperanta Grupo », kiu havas iom interesan originon. En la jaro 1916 ekzistis en Anglio *Ligo de Militrezistantoj*, nomita la « No-Conscription Fellowship ». Iu bone konata angla esperantisto, unu nokton, faris lekcion al kelkaj el iliaj anoj pri nia lingvo. Nur unu atentis la temon serioze. Li komencis lerni la lingvon, sed post tri semajnoj estis malliberigita, ĉar li ne volis mortigi « malamikojn ». Li estis malliberulo pli ol du jarojn, sed kiam li liberiĝis, li estis ankoraŭ fervora esperantisto. Li estis motorfiakristo k li propagandas inter siaj kolegoj. Li estas nek lerta esperantisto nek lerta propagandisto, k la Londona motorfiakristo estas tre konservativa ulo.

Post jaroj da solecaj penoj li renkontis alian motorfiakriston, kiu portis la verdan stelon. Ili ekĝojis k babiladis, dum aliaj kolegoj staris malfermbuŝe k sin demandis, kio okazas. Poste ili propagandis kune dum pluraj jaroj. Unu aliĝis al SAT, la alia restis en la neŭtrala movado, sed ne gravis — ili estis unue esperantistoj.

Subite la semita semo ekkreskis. Viroj, kiujn ili longe penis varbi, subite interesiĝis k eklernis la lingvon. Ili propravole kunigis sin en Taksiistan Esperantan Grupon, kiu kunvenas ĉiusabate en kafejo, kie ili manĝas, ĝojas, ridegas, konversacias esperante k « tiras la krurojn » de la du amikoj, kiuj ridetante sidas inter ili. La du estas nun iom maljunaj k lacaj, dum la plimulto el la grupanoj estas junaj, viglaj k fervore propagandas la lingvon. Preskaŭ ĉiusemajne alvenas iu nova lernanto k la grupo kreskas. Ĝi kresku. Ĝi estas nova k ankoraŭ malgranda, sed ŝajnas fortika. Kiu volas kuraĝigi ĝin, bonvolu skribi al la *Londona Taksiista Esperanta Grupo*, Café Vimont, 16 Silver St., *Londono W.C.*1.

E. J. W.

[1] Taksio = motorfiakro.

POR ŜTOPI LA BREĈON

Laŭ rekomendo de la XV-a Kongreso ni alvokas ĉiujn Gek-dojn fari sian eblon por helpi definitive likvidi la ŝuldojn kreitajn en la antaŭaj jaroj, kiuj ne estas forigeblaj per la ordinara buĝeto de la Asocio.

43. *listo.*

A.N. Swart, Broek i. Waterl. ..	5.—	fr. fr.
Coldefy, Aulnay	10.—	» »
Avid, Paris	5.—	» »
C. v. d. Meulen, Amsterd.	15.—	» »
Österholm, Malmö	17.40	» »
Santiago Moro, Barcelono	2.50	pes.

Kamaradecan dankon al ĉiuj donacintoj !

Interhelpa Abonservo

Por la monsumoj kolektitaj per tiu ĉi « Servo » k kvitancitaj en « S-ulo » (cetere jam delonge ni ne plu ricevis tiucelajn subvenciojn de K-doj volantaj helpi en abonpago por mizerstataj K-doj, precipe en faŝistaj landoj) — ni liveras en 1936 ĝis nun :

Po unu jarabono de « S-ulo » al malriĉa K-do (malnova SAT-ano) en Aŭstrio, al malriĉa K-do en Hungario, kies infanoj ankaŭ scias esp-on, al mizerstata studento en Parizo, al politika malliberulo en Polio, al 16-jara ftizmalsanulo en franca mar-sanatorio.

Se ni ricevos aliajn sumojn por tiu sama celo, ni povos plilarĝigi ankoraŭ tiun modestan helpservon al malfeliĉuloj.

Administracio de SAT.

Ne forgesu, ke SAT eldonas regule ĉiumonate

bele prezentitan, ilustritan 16-paĝan literatur-sciencan gazeton

SENNACIECA REVUO

Soci-politikaj artikoloj. — Raportoj el la tuta mondo. — Belliteraturo (poezio, prozo). — Scienco. Kritiko. Diskuto. — Jarabono : 25.— fr. fr.

Provnumero kontraŭ respondkupono.

SAT, 67, avenue Gambetta, Paris 20.

Kiel la sindikat-unueco en Francio estis restarigata

Ĵus ni travivis en Francio unu el la plej karakterizaj k plej interesaj okazintaĵoj en la laborista movado nuntempa, nome la en Tuluzo okazintan unuigan kongreson de l'Sindikataro.

De 1920 la franca sindikata movado estis skismigita, pro tio ke konsiderinda parto da sindikatanoj, forlasante la malnovan principon pri sendependeco de l'sindikatismo, aliĝis nove starigitajn sindikatojn de la Ruĝa Sindikatara Internacio, tiutempe fondita en Moskvo.

Post preskaŭ du jaroj da intertraktoj, nun la Tuluza kongreso likvidis tiun staton. La franca sekcio de l'Ruĝa Sindikatara Internacio, kiu estis unu el la plej fortaj de tiu Internacio, malaperis per restarigo de l'sindikata unueco sur la malnova fundamenta principo, ke la sindikata movado estu k restu sendependa de politikaj tendencoj, sendependa de ajna registara influo. Por certigi tiun sendependecon el partiaj aŭ ŝtataj instancoj, la delegitoj voĉdonis per ega plimulto — 5.508 voĉoj (2.569 sindikatoj) kontraŭ 2.411 voĉoj (1.031 sindikatoj) k 132 sindetenoj (41 sindikatoj) — la malpermeson al sindikataj funkciuloj esti samtempe funkciuloj en politikaj partioj aŭ parlamentanoj. Per la impona plimulto de 5.700 voĉoj (2.628 sindikatoj) kontraŭ 2.609 voĉoj (1.112 sindikatoj) k 141 sindetenoj (51 sindikatoj) la kongreso akceptis la vidpunkton de l'sindikatanoj de l' t.n. amsterdama internacio rilate la strukturon de l'organizo. Kaj per 5.463 voĉoj (2.566 sindikatoj) kontraŭ 2,513 voĉoj (1.051 sindikatoj) k 243 sindetenoj (82 sindikatoj) estis akceptita la aliĝo de l'reunuigita federacio al la t.n. amsterdama Sindikatara Internacio (anstataŭ resti aŭtonoma internaci-skale, kiel deziris la bolŝevikoj). Ĉiuj ĉi decidoj okazis post arda debato, en kiu montriĝis la diverso de l'vidpunktoj.

Kiel ĝenerala sekretario de l'reunuigita sindikataro estis elektita Ĵuho (Jouhaux), la sama K-do, kiu jam antaŭe estis ĝen. sekretario de l'amsterdamana sindikat-unuiĝo (CGT). Pri la orientado de l'organizo fine estis akceptita unuanima rezolucio.

1 768.

√ **P. Neergaard:**

Fremdvortoj en Esperanto

Originala studo pri lingva problemo, tre valora helpilo al lernantoj, studobjekto de superaj ekzamenoj ĉe la Centra Dana Ligo Esperantista.

64 paĝoj. Prezo : 4.80 fr.

SAT, 67, *avenue Gambetta, Paris* 20.

HOMAMO

Jam de kelkaj semajnoj oni povas legi en la diversaj gazetoj pri « ambulancoj trafitaj de bomboj, ĵetitaj el flugmaŝinoj ». (Temas pri la milito en Etiopio.) La gazetoj aldonas, ke estas skandalo k krimo, ĉar tiuj ambulancoj ja ne estas armeoj, ktp. !

Kelkfoje mi atente legis tiujn komunikojn, sed mi ne povas samopinii. Pro kio do la bravaj geflegistoj k kuracistoj iras al la fronto ? Pro homamo ? Ne, la kuracistoj iras tien, por kiom eble plej baldaŭ kuraci la vunditojn. Per la plej kruelaj modernaj murdiloj oni interbuĉas k mortigas unu la alian. La scienculoj streĉas la cerbon. Por la murditoj, la kuracistoj elpensas k aplikas bonajn kuracilojn. La geflegistoj laboregas, ili ofte en tre malfacilaj cirkonstancoj flegas la kompatindulojn, la difektitajn soldatojn. Tre ofte kun plena sukceso. Tamen, kio sekvas : La kuracitaj viktimoj denove iras al la fronto, k... la spektaklo ree komenciĝas. Bela, ĉu ne ? tia civilizo...

Certe, la scienco progresas, sed oni misuzas ĝin. Laŭ mi la bravaj kuracistoj k geflegistoj kulpas same

Kial organiziĝi en SAT ?...

kiom la ceteraj, kiuj okazigis la militon. Ili subtenas ĝin k tial en la tuta mondo oni adoras k estimas ilin, ĉar ili ja zorgas, ke la militmaterialo, nome la homa brutaro restu bonorda. Nur tiuj batalantoj, kiujn ili ne povos ripari, povas iri aŭ esti transportataj hejmen, kie ili trankvile povas finsuferi k morti.

Ho, veraj homamaj kuracistoj k geflegistoj, restu tre malproksime de la batalfronto, uzu k apliku vian konon ĉie, kie vere vi povas fieri pri viaj sukcesoj. Helpu la homaron kiom eble plej multe, sed ne estu apogilo por la kruela milito. *15 408*

Pri Korespondado

Mi volas direkti vian atenton al sufiĉe grava afero rilate la edukon de niaj lernantoj. Ni, kiel instruistoj, montradas al niaj lernantoj la utilan flankon de internacia korespondado. Daŭre ni instigas ilin serĉi adresojn de eksterlandaj Gek-doj por tiele, almenaŭ skribe, havigi al si ioman scikonon pri moroj, vivkondiĉoj ktp de alilandaj laboristoj. Tute kompreneble — estas malfacile korespondigi ĉiujn, ĉar ĉi tio ja kostas afrankon, — nuntempe sufiĉe multekosta afero. Multaj — inter ili eĉ senlaboruloj — tamen faras tiun elspezon, esperante iom profiti el ĝi rilate plian kleriĝon lingve k spirite. Sed kiom da ili post iom da tempo tute seniluziiĝas, ĉar sendinte leteron al petinto, anoncinta sin en « S-ulo » aŭ « S.R. », ili ofte ne ricevas respondon. Ankaŭ okazas, ke post kelka pli malpli vigla korespondado ne plu venas respondo. Vi komprenu, ke tiaj seniluziiĝintoj poste jam ne inklinas korespondi k moke ridas, kiam temas pri korespondado..., miaopinie, tute prave !

Mi scias, ke pri tio jam plurfoje aperis admonoj k riproĉoj en niaj organoj, k tamen mi ne povas ne averti tiajn « korespondemulojn ». Ricevinte korespondpeton aŭ aperiginte anoncon, ili almenaŭ estu tiom « ĝentilaj » respondi k se tempo mankas por daŭre korespondi, ili sendu almenaŭ poŝtkarton, enhavantan tiun sciigon. Ĉi tio certe evitos multe da seniluziiĝoj. Cetere mi — k multaj kun mi — opinias tion devo. Aliel oni ne anoncu sin korespondpreta !

Švarc (17858).

Tra la Esperanta Gazetaro

Esperantistaj superpatriotoj.

En la monata informilo de l'italaj esperantistoj (*L'Esperanto*), de 31.1., ni povas legi i.a. jenan klarigon pri la ital-etiopa konflikto : « Imperialismo, kapitalismo, framasonismo k komunismo formis kamarilon por detrui Faŝismon, kiu estas ilia komuna malamiko. Ilia penado fiaskos, k ties unika efiko estos gajni la eternan k profundan malamon de la itala popolo kontraŭ tiuj kiuj malnoble provas ĝin sufoki. Ni esperas, ke la plimulto el la tutmonda esp-istaro, kiu ĵus montris sian simpation al Italujo sendante plurajn reprezentantojn al la XXVII Universala Kongreso, ne estas en la nombro de tiuj, kiuj deziras la ruinon de Italujo... »

Ho, vi superpatriotaj verdstelanoj italaj, kies solan voĉon ni ja rajtas aŭdi sub tiu belega reĝimo, sub kiu vi vivas — ĉar la voĉo de l'aliaj, de niaj K-doj, estas ja brutece sufokita... ne temas ruinigi Italion — male, temas ĝin liberigi el la regado de tiu senkonscienca ulo, kiu ĵetas Italion en aventurojn por flegi sian propran gloron — pli vere malgloron.

Vi argumentas en superpatriota troestimo : « ... Kvardekkvar milionoj da italoj ne povas sufokiĝi en malvasta k duonmonta teritorio. La alta grado de civilizacio de la Faŝisma Nacio... postulas nun aliajn regionojn, ne dezertajn, sed fekundajn... » Nekonsidere la fian cinikon, kiun entenas la dua frazo, — ĉu do vi neniam pensis, ke povus ekzisti aliaj rimedoj por plibonigi la staton de l'italaj popolamasoj ol rabatako k amasbuĉado ? Sed ĝis tie vi ja ne pensas ; vi nur rutine papagas, kion via ĉefo al vi ordonas papagi. Kredeble tio estas atesto pri « la alta grado de civilizacio » ? Sendube tio estas via rajto ; sed vidu, kien do forvaporiĝis la tiom fama esperantista neŭtralismo ?! Kaj oni kredu, ke ekzistas homoj, kiuj opinias povi grupigi la klasbatalulojn kune kun la burĝoj k la faŝistoj en unu komunan organizon !! Al tiuj ni simple vokas nian ĉiam aktualan k trafan devizon : « For la Neŭtralismon » !

Nova gazeto en Portugalio

Dum januaro 1936 aperis en Lisbono la unua n-o de « Portugala Esperantisto », monata organo de la diversaj en Portugalio funkciantaj esperanto-societoj (grandparte laborist-tendencaj). Signo de l'reĝimo : surpresita estas noto, ke la enhavo estas kontrolita de l'ŝtata cenzuro. Grandparte la artikoloj estas verkitaj en portugala lingvo, tamen kelkajn esp-aĵojn oni ankaŭ trovas. Certe tia ligilo por la portug. esp-istoj respondas al vera bezono. Ni deziras al ĝi longan estonton k regulan aperadon.

La plej legata...

En « Lab. Esperantisto » (Amsterdamo) de marto troviĝas holandlingva fruntartikolo kun titolo « Dank'al nia unueco », en kiu estas elmontrita, kiel la volo unuecema de l'membraro ebligis la gravajn progresojn de la Federacio, pri kiuj ni raportis en feb. « S-ulo ». Konstatinte la rezultojn : nome preskaŭ 5.000 kursanoj ĉiujare, k ĉiujara eldonado de 5.000 lernolibroj, krom aliaj eldonaĵoj, pli ol 6.000 legantoj de « Lab. Esperantisto », la verkinto de l'artikolo demandas : « Kaj kiu fremdlingva organo en Nederlando sola posedas 4.000 legantojn, krom *Sennaciulo* ? »

Certe *Sennaciulo* estas ja la plej legata nenederlandlingva organiza gazeto en Nederlando

Aktiveco de neŭtraluloj en Britio

La jara raporto por 1935, rilate la agadon de l'Brita Esperantista Asocio, troviĝis en la marta n-o de « The British Esperantist ». Mi elektis el ĝi interesajn punktojn, kiuj spegulas la staton de l' neŭtrala esp. movado en Britio.

La raporto diras, ke la tuta membraro sumiĝas je 2,162 (en 1934 la anaro estis 2,020), t.e. 142 pli ol la antaŭan jaron. La pliiĝo rezultas el trijarplano proponita en 1935 kun celo meti B.E.A. sur sekuran bazon. Pro forta propagando 377 varbitoj estis logitaj al la asocio, sed 200 malnovaj anoj eksiĝis jarfine ; aliaj mortis. Ĉi tiu emo forlasi la asocion okazas ĉiun jaron. Personoj logitaj al la asocio perdas intereson k baldaŭ forlasas almenaŭ la asocion, se ne la esperantan ideon.

Finance ĝenate per tiuj eksiĝoj, la estraro faras alvokon al la membroj daŭre subteni B.E.A.-on, dirante, ke se estas ĝene al ili sendi ĉiujare la kotizon, ili povas pagi kelkjarajn kotizojn antaŭpage. Ordinara membro pagas kotize 5 ŝ. (ĉirkaŭ 20 f. fr.), t.n. « Fratuloj » 21 ŝ. (ĉ. 90 f. fr.). Inter la membraro estas 68 gejunuloj malpli ol dekok-jaraj. Dum 1935 la nombro de aliĝintaj grupoj estis 87, regionaj Federacioj 13.

Dum la pasinta jaro oni multe propagandis. Riĉulo donacis arĝentan pokalon, kiun ricevos la Federacio, kiu sukcesos varbi la plej grandan nombron da rekrutoj. Monpremioj, senpagaj vojaĝoj al Varsovio por Jubilea Kongreso, dumviva membreco estas proponataj.

Aŭtomobilo estas aĉetita lastjare k uzata de gravaj oficuloj por ebligi ilin viziti grupojn, ktp. Per ĝi s-o M. C. Butler, Edukada k Propaganda Sekretario (k red. de « British Esperantist ») veturis 25.250 kilometrojn k donis propagandlecionojn en esp-o en 101 popolaj k duagradaj lernejoj tra la lando, al 500 geinstruistoj, 15,000 lernantoj, k 6,000 lernolibroj venditaj reprezentas, kion faris s-ro Butler por esp-o, kun celo enkondukigi esp-on en la lerneja lecionaro.

La deficito de l'kaso atingis £452. Pro tio oni devis peti la pagon de £225 de « garantiuloj » ; tiele la neta deficito nun estas £226, ŝuldata de la asocio.

B.E.A. proponas starigi propran Esperantan « Domon » en Londono. Jam por tiu projekto estas ricevitaj kiel donacoj la sumo de £504, sed la bezonata sumo estas ankoraŭ £1,500, ĝis fino de 1937.

Kiel logilon por decidigi partoprenontojn al la Viena kongreso, oni reliefigas, ke la aŭstra kanceliero Ŝuŝnig mem k kelkaj el liaj ministroj patronos tiun universalan kongreson !

Th. Aldvorz (18 876).

Klare respondas al viaj demandoj la broŝuro

FOR la NEŬTRALISMON

3-a eldono

32 pĝ. Prezo : 1.80 fr. fr. (SAT)

FOTOAMATOROJ ! Kiu interŝ. kun mi fotogaz. k revuojn ? Ankaŭ korespondos pri fotoarto. *Alec. Shepherd*, 43 Reid St., *Dunfermline*, Britio.

Ĉe la Sportuloj

La Landa Lab. Sport-Asocio en Britio, jam subtenata de kelkaj sport-kluboj, entreprenas organizi specialan ĝeneralan kunvenon de *Neprofesia Atleta Asocio Britia* por protesti kontraŭ la okazigo de l'Olimpiado en Berlino 1936, ĉar la germana registaro per la uzo de sia aparato altrudas al tiuj ludoj sian politikan tendencon. En oficiale aprobita libro de Malitz « La spirito de la sporto en la tria regno » (senpage disdonita al ĉiu sport-organizo en Germanio) oni legas : « Ne povas havi pozitivan valoron, ke nia popolo permesu al malpuraĉaj judoj k negroj traveturi nian landon por konkuri atlete kun niaj plej bonaj. » La olimpiad-spirito ne povas ekzisti, kie regas tiaj kondiĉoj, k tial la N.W.S.A. (Lab. Sport-Asocio) opinias, ke ili gardos plej bone la esencajn interesojn per nepartopreno en tiu konkuro k retiro de ajna subteno.

(Komp. L. Rosenbloom-4305).

Frakcia Vivo

Komuniko de la Sennaciista Frakcio

Kvankam la regularo pri funkciado de « SAT-frakcioj », presita en la Jarlibro por 1936, ne havas statutan valoron, ni tamen volas disciplineme konformiĝi al ĝiaj postuloj. — Kio ne signifas, ke ni konsideras tute aprobinda ĉion, kio troviĝas en tiu dokumento.

Unu el tiuj postuloj estas, ke ĉiu frakcio « devas deponi kopion de sia Regularo aŭ Statuto ĉe la P.K. de SAT ». Ĝis nun nia Frakcio funkciis sen ia regularo k nur laŭ la propra iniciato k bonvolo de kelkaj sindonemaj K-doj. Sufiĉis deklari sian aprobon pri la enhavo de la *Manifesto de la Sennaciistoj* por fariĝi membro de nia Frakcio.

En tiu verketo troviĝas ideoj k konsiloj, kiuj povas esti nur utilaj al la esperanta movado ĝenerale k al SAT aparte. Sed por konformiĝi al la supre menciita regularo, ni do devas posedi ankaŭ ian fundamenton koncizan k klare difinitan. Tial ni proponas al la frakcianoj jenan tekston :

El la SAT-anoj, kiuj aprobas la enhavon de la *Manifesto de la Sennaciistoj*, estas starigita Frakcio, kiu celas :

1) Propagandi la sennaciismon inter la esperantistaro.

ĈIU POVAS LERNI ESPERANTON



Ne malofte oni aŭdas personojn, kies haroj nur komencas griziĝi, k kiuj tamen diras, sincere aŭ ne, ke ili estas tro maljunaj por lerni nian lingvon. La ĉi suba atesto de multokupita sesdekjarulo pruvas, ke ili estas malpravaj. Tial ni opinias, ke niaj legantoj bonakceptos la interesan konfeson de eminenta k saĝa homo, k utiligos ĝin okaze en sia propagando por nia komuna afero. La originala teksto de ĉi tiu letero, kies tradukon K-do Lanti bonvolis havigi al ni, estas skribita antaŭ dek jaroj. Ial ĝi estis publikigita nur antaŭ kelkaj semajnoj en granda semajna ĵurnalo : *La Tuthomara Patrio* (La Patrie Humaine). Esperelbe troviĝos K-doj por traduki la esperantan tekston k aperigi ĝin en nacilingvaj gazetoj.

Tiuokaze la legantoj notu, ke en la februara kajero de *Sennacieca Revuo* (1936) ni aperigis fragmenton el verko de Han Riner « La veraj interparoloj de Sokrato » en traduko de E. L. k kun klarigaj notoj pri la aŭtoro, necesaj por enkonduki ĉi tiun leteron. — *Red.*

« Mia Kara E. Lanti,

« Konfuzita mi estas pro tio, ke jam de multaj monatoj mi ŝuldas al vi ĉi tiun leteron. Dum longa tempo mi esperis skribi al vi alion, ol la konfeson, kiun, fine, mi rezigneme faras. Mi ŝatus gratuli min pro sukcesplena ellernado de esperanto. Ho ve ! dekfoje mi kredis scii ; dekfoje mi forgesis. Sed eble mia aventuro, simple rakontita, vekos ĉe kelkiuj utilajn pripensojn.

« Ĉiufoje, kiam mi povis dediĉi unu horon ĉiutage al la esperanta lernado, post unu semajno mi sentis min kapabla skribi en la artefarita lingvo ne nur al miaj amikoj, ŝajnis al mi, sed ankaŭ por publiko iom malsevera. Ĉiufoje, kiam neprokrastendaj okupoj senigis min je la facila k ĝoja laboro, ĉio estis rekomencenda. Se mi ne eraras, sufiĉus, ke mi persistu dum du sinsekvaj monatoj por ke la sukceso estu definitiva. Sed en la arbaro el miaj laboroj, kiel mi povus esperi tiom larĝan maldensaĵon ?...

« La malsukceso de la tro okupita sesdekjarulo, kia mi estas, konsilas, ŝajnas al mi, ke oni akiru frue la esperanto-scion. Krom tio, ke en la

2) Defendi nian laŭstatutan rajton ekzisti en SAT kiel hereza tendenco k eluzi ties organojn por diskonigi apartan vidpunkton pri soci-politikaj demandoj.

3) La kotizo al la Frakcio estas laŭvola, sed minimuma je 6 fr. fr. jare. Kompense la frakcianoj ricevas *Herezulo*-n, kiu estas « daŭre k senrezerve » en la servo de l'sennaciismo k plie publikigas materialon, kiu ne estas akceptebla en la SAT-organoj.

Al la Gek-doj, kiuj ne aprobus ĉi tiun projekton de regularo, ni petas, ke ili bonvolu konigi senprokraste sian opinion k proponi alian tekston.

Samokaze ni altiras denove la atenton de la laboristaj esperantistoj al tiu nia aserto : *neniu movado povas vivi k prosperi sen iu propra k laŭcela idearo.* La sennaciistoj opinias, ke la Zamenhofa t.n. *interna ideo* jam delonge ne plu kongruas al la stato de la esperanta movado, ke necesas do havi pli precizan k tute klare elmontritan celon. Prave-malprave ili firme opinias, ke nur en la *sennaciismo* la esperanta movado povas trovi la ideologian ligilon k la instigilon, kiuj kondiĉas la estontan venkon.

Nia planedo fariĝas pli k pli malgranda k la produktofortoj pli k pli potencaj ; malhelpas la unuiĝon inter la teranoj la naciisma ideologio, kies mistike absolutisma karaktero estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de milito inter la popoloj. Tiuj konstatoj pravigas la sennaciismon.

Ĉiuj informoj rilataj al la *sennaciismo*, estas riceveblaj ĉe la sidejo de l'Frakcio : ESPERANTO, 14, avenue de Corbéra, *Paris* (12). Al leteroj petantaj informojn oni bonvolu aldoni respond-kuponon por la afranko de la responda letero.

Komuniko de Bolenfrasat

(Adr. : Sv. Johannsen, ESPERANTO, Australiensvej 24, Kopenhago-Danio)

Pri la statuto. — La red. de « S-ulo » pro troa esperantigemo skribas (7-a linio de l'Statuto, punkto 3-a, « S-ulo » 438) anst. « demokrata centralismo » — *dem. centrismo*[1]. La K-doj korektu, ĉar ni kompreneble havas nenian rilaton kun la *centristoj*. Centrismo estas politika tendenco de tiuj, kiuj evoluas de reformismo al revoluciismo k inverse, dum centralismo estas organizformo. Konataj centrismaj tendencoj estas : en Francio — Pivert, Zyromski, Doriot, la grupo Spartacus, Que Faire ?, Action révolutionnaire, la brandleranoj (KPO) ktp ; en Anglio, I.L.P., en Germ. SAP, en Nederl. la skismuloj ĉirkaŭ Molenaar, ktp. Ni ne havas ajnan rilaton kun ili. Manĉestra K-do proponas ŝanĝi « en la kadro de SAT » per « inter SAT-anoj ». Pri tio venontfoje.

Aperis 4-a kajero de *La Permanenta Revolucio.* Enhavo : IV-a Intern. k milito, popolfronto en Francio, Rev. Proletaro k sankcioj, recenzo pri « ĉu konstruiĝas Socialismo en Sovetio ? ». Tra la esp. gazetaro ktp. La 5-a aperonta evtl. en marto enhavos duan parton de l'milittezoj, artikolon pri Staĥanovismo, evtl. pri sennaciismo k sepa Komintern-kongreso. La kajeroj kostas 0.20 dan. kr. Amplekso 16 paĝoj. *Oĉjo.*

[1] Pro la aldono de l'vorto *demokrata* la termino « centrismo » ne ŝajnas al ni miskompreniga, je la loko de l'pli peza « centralismo », k ne konfuzebla kun la politika tendenco nomata de Bolenfrasat. Oni povus eĉ ankaŭ diri : *centrigismo*, kio estas tute klara difino. — *Red.*

Fermita debato

Ni ne volas daŭrigi la en kelkaj n-oj de « S-ulo » okazintan debaton pri raportmaniero rilate la lastjaran IPE-kongreson. Pro tio ni ne publikigas kelkajn ankoraŭ ricevitajn leterojn pri tiu afero. Sed ni povas sciigi al K-do Prent, ke fakte ni ricevis en aŭgusto poŝtkarton de K-do Scott, kiun ĉi lasta sendis tuj kiam li rimarkis la aldonajon de K-do Prent al la delegit-raporto. K-do Scott diris, ke li malakceptas respondecon pri tiu aldono. *Redakcio.*

Tasko de SAT estas kutimigi, en nia naciisma epoko, la membrojn al eksternacia sent-, pens- k agadkapablo. Tasko de SAT neniel estas organizi politikajn batalojn; ĝia rolo tiurilate estas nur informa. La taskaro de SAT estas sufiĉe grava, por ke ĉiuj sindonemuloj sin dediĉu plene al ĝia plenumado en unuecema, ne en partieca spirito. Kaj por tio ne necesas malkonfesi sian propran tendencon, necesas nur eviti la disputojn per reciproka toleremo.

ESPERANTISTOJ EN TUTMONDO !

Nia esperanto-klubo aranĝos la 20.IV. internacian letervesperon. Skribu amase al ni ! Resp. garantiata. Ĉion adresu al :

Luise Andrée-Karlsson, Vaktbergsv. 20, *Nynäshamn*, Svedio.

En nia movado

(Kroniko)

Ĉeĥoslovakio. En *Plzeno* estas sufiĉe granda nombro da lab. esp-istoj, organizitaj en du memstaraj grupoj, nome « Peklo » k « Kulturo », kiuj vivas en malharmonio tute ne komprenebla por ni novuloj, ĉar en ambaŭ plejparte estas socialdemokratoj. Grupo *Peklo*, kies ano mi estas, ekskursas ĉiudimanĉe en la proksiman ĉirkaŭajon de Plzeno. Kelkfoje mi persone invitis K-dojn el « Kulturo » partopreni k plifortigi nin, sed ĉiam sensukcese. Krome ekzistas en P. « Burĝa grupo », « Germana grupo » k « Nacisoc. Esp. Grupo », sed neniu *katolika*. La nomitaj grupoj estas unuigitaj sub nomo « Okcidentbohemaj esperantistoj ». Tie kunlaboro eblas, sed inter du lab. grupoj ne, eble pro tio ke iu K-do ne plaĉas al alia. La en « S-ulo » (dec.) sub « Tra la Gazetaro » aludita ekskurso al « vilaĝpastra moŝteto » estis aranĝita de O.B.E., kun kiuj ni devas labori, ĉar solaj ni signifas nenion. Mi dezirus, ke ni baldaŭ sukcesos kunlabori en plej bona harmonio. (*O.B.*, 18 732.).

Francio. En *Havro* (Le Hâvre) okazos dum la paskotagoj la 16-a Kongreso de la Federacio de Lab. Esperantistoj (FEO). Unu el la ĉefaj punktoj de la tagordo rilatas al la unueco de l'lab. esp. movado en Francio. — K-do *Gabriels* informis nin el Marsejlo, ke li akceptigis esp-on k FEO al 145 delegitoj de Komjunulara Konferenco.

Nederlando. La 8. februaro fondiĝis en sekcio Amsterdam-V la unua infangrupo, kiu akceptis la nomon « La Mondamikoj » k kunvenas ĉiudimanĉe de 10-12-a horo en Hudsonstrato 127 (Amsterd. W.). Ĉiu infano pagas semajne 5 cendojn da kotizo. La kolektita mono servas por abonoj al « La Vojo » k por afranko de kolektiva korespondado. Gvidantino : K-dino *M. Bishoff* (Laŭ « La Vojo »).

Svisio. La 7-a Kongreso de l'Svisaj Lab. Esperantistoj okazos dimanĉon, la 29-an de marto, en la Oltena Popoldomo. Demandojn k proponojn akceptas K-do *J. Wild*, Zürcherstr. 58, *Schlieren b. Zürich.*

INSTRUISTOJ ! ATENTU !

Nia departementa sindikato deziras *praktike* meti esperanton serve al la laboristaro, rilatiĝante kun sammetiaj sindikatoj aŭ sindikatanoj. Interesataj kolegoj, skribu multnombre al la peranto, kiu detale respondos : *Lentaigne*, instruisto, *Villeveyrac* (Hérault), Francio.

junuleco la libera tempo estas pli granda, k malpli granda k krianta la hordo el zorgoj, la memoro estas duoble favora : facile ĝi lasas sin penetri, facile ĝi konservas kion oni donas al ĝi garde.

« Estus tamen nejuste senkuraĝigi niajn samtempulojn. Ne ĉiuj havas kiel mi tiom da embarasoj. Multaj trovos senmalhelpe la necesan tempon k la kontinuon. Estante malpli solecaj ol mi, ili parolos en esperanto. Malofte, cetere, estas la personoj, kiuj estas tiom malrekomendindaj, kiom mi por la eksperimento, kiun mi provis.

« Oni scias, ke ni ne havas unikan memoron, sed kelkajn, diversajn k neegalajn. Dum mia tuta vivo mi kulturis mian priidean memoron k malzorgis la privortan. Facile mi memoras serion da pensoj k iliajn flekseblajn aŭ rigidajn interligitaĵojn. Apenaŭ mi povas rilatigi daŭre novan vorton ĉu al la objekto, kiun ĝi signas, ĉu al la vorto kiu, en mia lingvo, ĝin nomas. Mi penis akiri bonan memoron de filozofo k de oratoro ; mi preskaŭ lasis malpliiĝi, neniiĝi mian memoron de poligloto. Eĉ ĉi-kaze necesas distingi. El la lingvoj, kiuj mi lernis, mi rekonas la vortojn ĉe legado ; mi ne retrovas ilin por skribi. Mi eble estus lerta en traduko al mia gepatra lingvo, sed certe mallerta por traduki el tiu lingvo en fremdan. Sur tiu kampo mi faris gravajn perdojn ne nur pro malzorgo, sed kun ia aktiva kunkulpeco de mia volo. En mia junuleco mi skribis latine, provence k itale. Formalaperintaj kapabloj. Okazis tiel, ĉar jam delonge mi diligentas esti artisto en franca lingvo k mi kredas, pravemalprave, ke tiu muzikisto plej bone sukcesas, kiu ĉiam ludas per la sama instrumento. Kiam mi diligentis skribi en esperanto, tiam mi perfidis unu el la larĝaj antaŭdecidoj el mia vivo k mia subkonscio kontraŭstaris, mi kredas, al mia konscia penado k tre malfortigis ĝian povon.

« Mi do, kara amiko, rezignacias resti la senpova esperantisto, kiu ĝoje legas, sed ne sukcesas skribi, aŭ nur laŭ subitaj k mallongaj intermitoj.

« Ke mia ekzemplo kuraĝigu la junulojn k tiujn, kiuj havas liberan tempon k tiujn, kiuj ne bezonas venki la samajn malfacilaĵojn kiel mi. Kiuj havas iun morgaŭon antaŭ si, tiuj rapidu akiri la ilon, kiu morgaŭ estos necesa al ĉiuj.

« Kaj mia mezbona esperanto el kelkaj dimanĉoj, kiel mia ĉiutaga lingvo franca, utilu al mi por diri, mia kara Lanti, mian tutan simpation por via persono k por via fratiga laboro. »

Han Riner.

Pri kursoj en Danio

La dana esperantistaro estas relative granda, sed la «gravuloj», t.e. ministraro k radio ne multe atentas nin. Por servi al la progreso de esp-o k doni al eksterlandanoj favoran okazon viziti Danion, kie oni momente povas pasigi agrablan ferion tre malmultekoste pro la malalta enlanda monvaloro, ges-oj Stig B. Skole, «KORNMOD», *Silkeborg,* aranĝos kursojn, en kiuj partoprenos homoj el multaj landoj. De 3. majo ĝis 31. julio estos 3-monata kurso, kiu nur kostas 70 dan. kr. aŭ 23 guldenojn. De la 10. ĝis 19. julio k de 22. ĝis 31. julio estos 10-tagaj kursoj, kiuj nur kostas po 40 kronoj aŭ 13 guld.

En la kursoj instruos eminentaj instruistoj : krom danoj, prof. Collinson, prof. d-o E. Privat, prof. W. Rerendsohn, Germ., s-ro A. Weide, Germ., s-o de Ward, Nederl., ges-oj Stellan Engholm, Sved., poeto Thorbergur Tordarson, Islando, k eble pli. Silkeborg situas en la mezo de Jutlando inter arbaroj k belaj lagoj. Eksterlandanoj ! Vizitu la kursojn en Silkeborg en la venonta somero.

Korespondado

(Simpla trilinia anonceto kostas 4.50 fr. fr.)

AŬSTRIO

K-do *Hans Schweitzer,* Turnerstr. 6, *Salzburg-Gnigl,* 23-jara, dez. interŝ. PI kun ĉiuj landoj. Nepre respondos !

FRANCIO

K-do *Denis Pollak* dez. korrespondadi kun Gek-doj el Hispanio. Mi respondos certe. Adreso : 8, rue Baillet, *Paris.*

GERMANIO

K-do germana abonos por unu jaro «S-ulo» n (event. poste ankaŭ S. R.) al korespondema K-dino. Kondiĉoj : regula k vigla leterinterŝanĝo pri ĉiuj temoj. Ĉefajo : regula funkciado de l' korespondado sur baso garantianta mian sekurecon. La adreson peros la redaktejo de «S.-ulo».

HISPANIO

K-do *Luis Paĝés,* Fonda Cerilla *Palamós* (Gerona), dez. kor. kun kaŭĉuk-teknikistoj aŭ laboristoj, laborantaj en fabrikoj de kaŭĉukaj objektoj.

K-do *Rafael Sorolla,* s tr. Torrent de'n Vidalet, 13, 1º *Barcalona,* dez. interŝ. PM ĉl, 100 kontraŭ 100, eaŭ baso «Yvert». Resp. garantista.

JUGOSLAVIO

Dez. kor. kun esp-istoj el Francio K-do *Petar Trdoslavic,* Merŝiceva ul. 8 B/36, *Zagreb.*

NEDERLANDO

Stud. pri kemio dez. kor. kun ankoraŭ kelkaj lab. tendencaj intelektuloj el slavlingvaj landoj, Hispanio aŭ hisp. lingva Ameriko. Adr. : K-do *F. Oliemans,* Schepenstr. 85, *Rotterdam-C.*

Deziras kor. kun Gek-doj el Cobn k ĉirkaŭaĵo (Irlando) (resp. gar.) K-dino *A. Alexander,* v. Wijnkade, *Maassluis.*

USONO

Korespondantoj atentu, ke la adreso de SAT-ano 1.307 nun estas : *Th. Weder,* 239 East 122nd Street, *New York, N.Y.*

Internacia Esperanto-Altlernejo
"KORNMOD", Silkeborg, Danlando

3-monata kurso de 3. majo ĝis 31. julio 1936. De 10. ĝis 19. k de 22. ĝis 31. julio du specialaj internaciaj kursoj. En la 10-tagaj feriaj kursoj lekcios universitataj profesoroj k eminentaj ekster- k enlandaj esperantistoj.

Bonvolu peti programon k detalajojn ĉe *Lernejestro Stig B. Skole, Silkeborg,* Danlando.

Ekster nia Movado

Post sukcesaj paroladoj en Utreĥto la ĉefredaktoro de l'grava ĵurnalo «Utrechtsch Nieuwsblad», d-ro Goedhart, estis varbita por nia afero k mem redaktas de nun konstante aperontan esp-rubrikon en sia ĵurnalo.

En Danio la esp-movado bone progresas dum la lastaj jaroj. Por akiri la plej gravan ĵurnalon por esp-o k ankaŭ por re-akiri la disaŭdigojn pri esp-o de la radio-stacio Kalundborgo, oni alvokas, por ke eksterlandanoj skribu al «Politiken», *Kopenhago* (adreso sufiĉa), petante pri utiligo k subteno de esp-o.

La 25-a Belga Esperanto-Kongreso okazos la 30-31-an de majo k 1. junio en *La Louvière.* (aliĝo : 15 b fr.). Enlanda fervoja rabato : 35 %. Aperis specialaj glumarkoj k senpaga faldprospekto. Adreso : 1, rue St-Joseph, *La Louvière.*

La 17-aj Internaciaj Floraj Ludoj okazos kun la 18-a Kongreso de Kataluna Esp. Federacio. Por bonaj originalaj k tradukitaj verkoj estas destinitaj libropremioj . Por partopreno sin turni al K.E.F., carrer Valéncia 245, *Barcelono.*

RADIO-NOTOJ

Hilversum (V.A.R.A.), ondolongo de aprilo denove estas 301,5 m. Esp. elsendoj ne plu okazos je 19.40 h MET, sed *proksimume* je 17,10 MET *inter la elsendoj* de filharmonia orkestro. (Neeblas fiksi la ĝustan horon). Daŭro laŭeble 15,20 aŭ 30 min. : je 11.4., 25.4., 9.5., 23.5., 6.6., 20.6.

Al niaj membroj en Jugoslavio !

La pago de kotizoj pere de l'firmo Celap (Zagreb) montriĝis nepraktika. Ni do konsilas pagi kiel antaŭe, nome per ĝiro rekte al *nia* propra poŝkonto : Zagreb n-o 41.448.

Recenzejo

PROF. G. WARINGHIEN : *Facilaj Legaĵoj.* Eld. *Esperantista Centra Librejo,* Paris 6. Kolekto de Franca Esp.-Instituto, n-o 2. — 96 pĝ. Form. 11,5 × 16,5. Prezo : 5 fr. fr.

Jen nova legolibro, kiu celas «amuzi la legantojn k inspiri al ili la deziron al plua legado.» Oni trovas en ĝi unuaparte multspecajn distraĵojn (inter ili versojn aperintajn en «La Lernanto» k en «Prologo»), k due ekstraktojn el verkoj de Zamenhof k aliaj bonaj esperantaj stilistoj el la unua periodo de esperanto. La elekto de l'materialo estas trafe farita, la preso estas klara k korekta.

UNUA PAŜO AL LA VOJO DE SCIENCO : ASTRONOMIO. Kompilis *Joĉaŝien.* 1935. 24 paĝoj. Form. 9,5 × 15 cm. Prezo : unu resp. kupono (20 ekz. kontraŭ 15 resp.-kup.). Adreso : P. O.-kesto 274, *Shanghai* (Ĉinio).

Negrava broŝureto, kiu entenas tro malmulte, por kontentigi eĉ la elementan scibezonon de tiu, kiu volas okupiĝi pri astronomio. La tekston ilustras kelkaj desegnoj.

ZAK-WOORDENBOEKJE F.L.E. (Poŝvortaro esp-nederlanda k nederland esp-a). Eld. *Federacio de Lab. Esp-istoj en nederl. regiono,* Postbus 0.50., *Amsterdam.* 80 pĝ. Form. 8,5 × 12 cm. Prezo : 0,12 ½ gd.

Tiu ĉi praktika vortareto, kompilita de K-do H. W. Alings, la redaktoro de «Lab. Esperantisto», entenas 2.400 esp. radikvortojn k 2.800 div. holandajn vortojn.

N. BARTELMES : *The Esperanto Grammar according to «Petro»* (La Esp. Gramatiko laŭ «Petro»). Eld. «Nia Bulteno», 117 N. Bunker Hill Ave., *Los Angeles* (Calif., Usono). Prezo : 1 resp. kupono aŭ 10 us. cendoj. Form. 12× 16,5. 28 pĝ. Helpilo por anglalingvanoj studantaj laŭ la SAT-lernolibro «Petro». Uzebla en kursoj, sed ankaŭ por memlernado. La libreto aperis dank'al la iniciatemo de K-do J. Ege (Los Angeles).

Jarlibro de la Esperanto-Movado 1935 (Suplemento al la eldono 1934). Eld. UEA, 1, Tour-de-l'Ile, *Genève.* 80 paĝoj. Form. 11× 16 cm. Nur por membroj. Pro la krizo ne aperis kompleta Jarlibro, sed nur suplemento al la antaŭa ; ĝi do entenas nur la ŝanĝojn okazintajn en la adresaro dum la jaro 1935.

Grossglockner Transalpa Ŝoseo (Salzburg, Karintio). Bele ilustrita k bone aranĝita faldprospekto (gvidlibreto) pri altmontara regiono aŭstria. Mendebla ĉe Grossglockner-Hochalpenstrassen A.G., *Salzburg.*

Franclando dum printempo. Ilustrita prospekto 12-paĝa, kiu havas la celon atentigi pri la Pariza Foiro (la proksima okazos de 16. majo ĝis 2. junio 1936). La P. Foiro uzas daŭre esperanton. La prospekto estas senpage ricevebla de , *Foiro de Paris,* 23, rue N.-D.-des-Victoires. *Paris* 2.

INTERNACIA LJONA FOIRO (5.-15. marto 1936). Okaze de tiu ĉiujara komerca aranĝo estis eldonataj belaj prospektoj k eĉ kvardekpaĝa ilustrita broŝuro kun klarigoj en esperanto, krome nova afiŝo kun esp. teksto (kvinkolora, formato 60×100 cm.). Al ĉiu petanto la Ljona Foiro sendos senpage tiujn presaĵojn, kune kun sorbpaperoj k ilustr. poŝtkartoj. Adreso : *Foire de Lyon,* Esperanto-Fako, rue Ménestrier, *Lyon* (Francio).

VIENA FOIRO eldonis belan, ilustritan, plurkoloran prospekton kun esp. teksto, kiu estas ricevebla ĉe : *Zentralbüro der Wiener Messe-A. G.,* Messeplatz 1, *Wien VII* (Aŭstrio).

AL LA KONGRESVIZITONTOJ.

La Londona Laborista Esp. Klubo aranĝos propagandan k socian vesperon por la sabato antaŭ la Kongreso la lan, de aŭgusto, k invitas la kongresontojn, kiuj trapasos Londonon k povos resti, informi la sek. inon K-dino *E. Moon,* 12 Aldborough Rd., ILFORD, Essex. Komuna karavano por la vojaĝo de Londono al Manĉestro estas aranĝota.

MEMORNOTO

PRIESPER. ARTIK. K NOTOJN ENHAVIS : *Signalen,* Stokh., 13., 20., 27.2.. 5.3. ; *A Vida Social,* Lisbono, 1.2. (paĝo) ; *Voix du Peuple,* Lyon, 15.2.

PRI SAT RAPORTIS : *Marseille-Socialiste,* 15.2. (konstanta rubriko) ; *Le Combat marxiste,* Paris, 28/29 (okaze de R. Rolland-naskiĝfesto).

NIA POŜTO.

No-Ra. — «Petro» kostas 6.— fr. fr.
Muri. — Viaj sendaĵoj aperos.

KOREKTU EN LA JARLIBRO :

La adreso de la Peranto en GRONINGEN (Nedl.) estas malnoviĝinta; la ĝusta adreso estas: K-do H. HOOGHUIS, Grunostr. 14, Groningen.

LA LABORISTA KLUBO en ÖREBRO havos letervesperon en aprilo. Ni petas Gekamaradojn en la tuta mondo sendi leteron k PK. Adresu al : *La Laborista Esp. Klubo, H. Kjellander,* Fabriksgatan 20, *Orebro,* Svedio. Certa respondo.

Grupeto de nov-verdiĝintaj Gek-doj dez. konatiĝi kun la mirakloj de Esperantio k por tio letervesperos fine de aprilo. Skribu amase al : *Feiko Munniksma,* Vinkenstr. 25 b, *Groningen,* Nederlando. Resp. garantiata.

CENT INFANOJ el Roterdamo deziras korespondi kun infanoj el la tuta mondo. Skribu grandnombre al K-dino *A. C. Obbes,* Boezemlaan 24 b, *Rotterdam,* Nederlando.